

& Balado pri l' akuzativo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 407 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Vladimír Gazda (Frenezetaĵoj, Bratislava 1992). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Li renkontis junulinon - ; - kia ĉarmo, kia belo! - ; en l' okuloj fajro flamas, ; sur la brusto verda stelo.

(×: **Kazon li foje forgesas ; Gramatikon ĉu progresas ; Tial ŝi forlasas lin ; Kazon li foje forgesas.**)

'2 "Kie povus vi renkonti ; mi junul' vi admiranta?" ; li demandis. Ŝi respondis: "En la klubo Esperanta."

'3 Li do venis en la klubon. ; Tie li kun ĝojo vidis, ; ke l' knabino admirata ; inter la ceteraj sidis.

'4 Li atendis, paciencis; post kunveni li tuj iris ; diri al ŝi: "Mi vi amas!" ; Sed ŝi nur la brovojn tiris:

'5 "Pri amoro mia, knabo, ; tute vane vi petegas; vanas amo via, se la ; kvaran kazon vi ne regas.

'6 Ja vi diris: Mi vi amas. ; Estas ĝi malbona frazo, ; ĉar en tiu frazo mankas ; la gravega kvara kazo!"

'7 La junulo do kuregis ; gramatikon tuj aĉeti; post kleriĝo li denove ; pri favor' ŝin volis peti.

'8 Sed virinoj – eĉ la verdaj! - ; estas bando ja puninda: ; aŭdu ĉiuj, kion spertis ; la junulo kompatinda:

'9 Li, povrulo, sidas hejme, ; lernas la akuzativon, ; dum ŝi kun amikoj siaj ; ĝuas la agrablan vivon.

'10 Kian el ĉi okazaĵo ; ni instruon ĉiuj havas? ; Por sukcesa amindumo ; lingvokono bona gravas!

'11 Kio estas la instruo ; el ĉi malgajeta kanto? ; - Ke ne provu spertulinon ; amindumi komencanto!